# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-48 sendita el Budapeŝto la 9an de novembro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO 80 en Ĉinio aldonita decembre

Pri AMO 78 en Kroatio (nov. 13-14) kaj AMO 79 (nov. 28), ni jam abunde raportis, laste en EKO 40 aperis la temoj kaj foje eĉ la programoj. Nun ni anoncas la malfruan aldonon de AMO 80 en Ĉinio. Tio okazos decembre, kredeble hibride, pli-malpli en la tempo ĉirkaŭ la Zamenhofa festo. Sed temas pri altnivela plan-kunsido, kiu kunvenigos dudek kvin provincajn sekretariojn (ĉefojn). Do, temos pri tut-Ĉinia planado, kio estas temo grava por AMO – memoru, ke Ĉinio estas la plej granda Landa Asocio ene de UEA. Aparte, ni levos la temon, kiel eblos proponi pli da junaj membroj por UEA.

Mapo de la ĉinaj provincoj aperos en <Landa Parad’> por Azio 2021, nun en finpreparo. Ĝi enhavos plurajn mapojn de Aziaj landoj kaj fotojn, precipe de sidejoj kaj oficejoj.

Sekve la jarfina AMO-seminario en Togolando iĝos AMO 81, la proponita AMO en la Aŭstralia/Nov-Zelanda kongreso januare iĝus (se konfirmota) AMO 82, kaj la plia seminario planata por Ĉinio en la periodo feb.-mar, iĝus AMO 83.

## Poemoj el la Belartaj Konkursoj (BK)

Sara Spanò recitas la poemon "Fratinoj" de Krys Ungar, en la Ceremonio de disdono de premioj de la Belartaj Konkursoj de UEA 2021.
https://youtu.be/Kpbn_qtDJHw

"Soneto de la lumturo" (Suso Moinhos), deklamita de Miguel Fernández:Festo 2021
https://youtu.be/eisuSsh3Wnk

mga

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ilei

Helpantoj:
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François
Lo Jacomo

**ENHAVO**


- AMO 80 aldonita
- BK daŭre donacas
- Senegalo preparas sin
- SAT en Parizo
- Kipra kurso

## Senegalo preparas sin por la Afrika Kongreso

Ekde junio 2021 ĉirkaŭ kvardeko da personoj en Senegalo pli-malpli regule ricevas Esperanto-instruadon sub la gvido de Lafi Charles Diatta per *whatsapp*-grupo, kadre de la kampanjo Hans Bakker kaj ankaŭ responde al la landskala iniciato de senegalanoj mem, nome 'Vigla Esperanto-jaro 2022 en Senegalo'. Laŭ Lafi Charles Diatta: "La celo estas helpi al la progresantoj perfektigi sian lingvo-scion, kuraĝigi komencantojn progresi en la lingva lernado, emigi hezitemulojn esperantistiĝi kaj fine pliigi la nombron de enlandaj Esperanto-uzantoj".

Senegalaj esperantistoj ne nur limigas sian iniciaton al nura distanca lernado per poŝtelefono, ili intencas ankaŭ malfermi okazajn ĉeestajn semajnofinajn kursojn, kaj ili alvokas: "Abundas tra Esperantujo vojaĝemaj instruemuloj, trejnistoj kaj ni volonte bonvenigas kunlaborproponon de tiuj personoj, instancoj zorgantaj pri instruado pri aranĝo de ĉeestaj kursoj en nia lando".

Senegalo havas kunorganizan kurso-sperton jam kun kelkaj movadanoj, el kiuj citindas Mireille Grosjean kaj Privas Tchikpe. Tiuj ĉi en decembro 2012 vizitis la landon kaj gvidis surloke plensemajnan instruadon, kiu finiĝis per sukcesa ekzameniĝo de la kursopartoprenintoj. En Senegalo okazos en julio 2022 la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) kun AMO-seminario de UEA.

Adjévi Adjé

## SAT en Parizo omaĝas al la Zamenhofan-feston

En la 12a de decembro okazos la Zamenhof-festo en la propra sidejo de SAT. Jen poŝtkarto reklamilo por konigi la eventon kaj doni bazajn faktojn pri la frua vivo kaj laboro de Zamenhof. Kompreneble tra la mondo okazos sennombraj Z-festoj, en EKO ni ne povas mencii ĉiujn. Sed ni volonte ricevos informojn post la evento, prefere kun fotoj.

Por havi superrigardon pri la festoj, faru la sekvan serĉon:

https://eventaservo.org/serchilo?query=Zamenhof



## Kipro aktivas per pretigo de greka retkurso




## Amuza kvizo kontribuas al serioza esplorado

UEA kunlaboras kun Ella Gryf-Lowczowska, 23-jara studento de la Universitato de Bristol, en ŝia magistriĝa tezo pri la uzo de Esperanto kiel studokazo por la disvolviĝo de algoritmoj kapablaj “lerni” gramatikon. Por tio ŝi bezonas, ke esperantistoj helpu per respondado de esplorkvizo, kiu proponas frazojn kun mankantaj afiksoj, kiujn la respondantoj devas indiki el donitaj opcioj laŭ siaj juĝoj pri la plej taŭgaj.

Por respondi oni devas aliri la jenan ligilon: https://mallonge.net/ella (temas pri formularo ĉe Guglo). Ĉiuj respondoj estos anonimigitaj. Flueco en Esperanto ne estas postulata por respondi, nur baza kompreno pri la gramatiko kaj sistemo de afiksoj de Esperanto.

Ella Gryf-Lowczowska magistriĝas pri komputila neŭroscienco ĉe la Universitato de Bristol. Multaj algoritmoj ŝajne “lernas” lingvojn per statistika inferenco, do povus sukcese antaŭvidi la afikson uzendan kun iu radiko post ripeta rigardado de similaj frazoj, sed ili ne povas etendi la subkomprenatajn gramatikajn regulojn al antaŭe nerigarditaj nesimilaj frazoj. Ili ne “komprenas” la lingvon kiel la homoj. La algoritmoj kreitaj de Ella celas “lerni” la gramatikajn regulojn de Esperanto. Ŝi uzos la homajn reagojn al kvizoj por kompari kaj taksi la sukcesan funkcion de la algoritmoj.

UEA antaŭdankas nome de Ella pro la partopreno en la kvizo, kiu estas amuza kaj facila.

Fernando Maia Jr., **Universala Esperanto-Asocio,** Vicprezidanto

# Slovakio kontribuas al la komerca komunumo




La 24an de oktobro 2021 okazis la 38a Dimanĉa Kunsido (DK) kun 36 partoprenantoj el Brazilo, Ĉinio, Kanado, Mongolio, Slovakio, Svisio, Tanzanio kaj Turkio. La temo estis "Ŝanco por nia movado malfermiĝi kaj krei kun neesperantista kompanio partneran kunlaboron" (preleganto: s-ro Jozef Reinvart el Slovakio). Vi povas legi la prelegaĵon ĉe

https://www.ikef.info/forum/dk-dimanca-kunveno/ikef-invitas-vin-al-la-38a-dk IKEF-Estraro

# GEA eniras la debaton ĉe Eŭropo

Dum sia jarĉefkunveno en la 30-a de oktobro 2021 la Germana Esperanto-Asocio (GEA) akceptis rezolucion pri la estonteco-konferenco de EU. La teksto unue mencias la intereson de la GEA-membroj pri la konferenco kaj pri la enmetitaj proponoj. Poste ĝi elstarigas kvin proponojn ligitajn al Esperanto.
Krome la teksto atentigas pri la tutmonda disvastiĝo de Esperanto kaj la rekono de Esperanto kiel parto de la nacia kultura heredaĵo deflanke de Pollando kaj Kroatio. En Hungario eblas ekde jardekoj trapasi ŝtatajn ekzamenojn pri Esperanto. En pluraj EU-ŝtatoj okazis lernejaj eksperimentoj, kiuj pruvis la taŭgecon de Esperanto kiel unua fremdlingvo por faciligi la lernadon de posta lingvo. Esperanto ankaŭ kontribuas por subteni la lingvan diversecon de Eŭropo, konstatas la rezolucio.

Surbaze de ĉi tio la membroj de la Germana Esperanto-Asocio (GEA) plu kontribuos al la transnacia demokrata debato pri la estonteco. La rezolucio finiĝas per la konstato, ke la membroj de GEA atendas politikan respondon, kiel ĝin promesis la prezid-antaro de la konferenco. Prezento de la proponoj aperas ĉe:

https://www.esperanto.de/eo/enhavo/esperanto-en-eu

Lu Wunsch-Rolshoven, Germana Esperanto-Asocio, Gazetara komisiito

La Akademia Kunsido menciita en la antaŭa AMO okazos **decembre,** ne novembre.

========= vortoj: 950 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **17a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.